

Sten Johansson

KARA KATRINA

Facila rakonto



Kara Katrina

Kvara rakonto pri Katrina

Facila rakonto kun klarigoj de la malfacilaj vortoj kun aldono
en la angla, japana kaj korea lingvoj

Originale verkis Sten JOHANSSON

Glosis en la angla lingvo la aŭtoro kaj Edmund GRIMLEY
EVANS

Glosis en la japana lingvo AIKAWA Setuko kaj ...

Glosis en la korea lingvo Tamara Park

Unua eldono: Seula Esperanto-Kulturcentro

Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj ĉe la aŭtoro kaj la eldonejo

Distribuas: Seula Esperanto-Kulturcentro

#301-a, 3-a etaĝo, 87, Dongjak-daero 7-gil, Dongjak-gu, Seulo
Koreio. (010-3340-5936)

Retpoŝto: leejungkee@khu.ac.kr

Presita en Seulo, Koreio en 2025

<PREZO>

EUR: 3eŭroj, JPY: 500enoj,

KRW: 5000ŭonoj

(sendkosto aparte)

국민 068-21-0187-603 (이중기)

www.esperanto.kr

Sten Johansson

KARA KATRINA

Facila rakonto

Unua eldono

Enhavo:	Paĝo
1. Sur neĝo en la nordo.....	5
2. Muzika familio	7
3. Kara Katrina	9
4. Koramikoj.....	12
5. Martin en Stokholmo	15
6. Komenco de la ferioj	18
7. Velado reen.....	21
8. Renkonti la patron	24
9. Martin en Parizo	27
10. Manifestacioj	30
11. La tasko de Martin.....	34
12. Polica esplorado.....	37

1. Sur neĝo en la nordo

Estas vintro en la nordo. Neĝo kuŝas sur ĉio. Katrina havas feriojn. Ŝi vojaĝis al la nordo por ripozi kaj skii. Ŝi vojaĝis kun Martin, Fredrik kaj Erika. Martin estas ŝia filo. Fredrik estas ŝia frato kaj la onklo de Martin. Erika estas la edzino de Fredrik.

Ili vojaĝis al la turista loko Åre en la mezo de Svedio. Apud Åre estas monto. Tie estas multaj deklivoj por skiado. La loko estas plena de turistoj. La plej multaj turistoj venis el suda Svedio, sed kelkaj venis el aliaj landoj. Ĉiuj venis tien por skii. Kelkaj skias lerte, aliaj mallerte. Tio ne gravas, ĉar ĉiuj ĝuas. Skiado malsupren sur deklivo estas amuza. Kelkfoje ili falas, sed tio ne gravas.

Martin, Fredrik kaj Erika skias lerte, sed Katrina skias ne tre lerte. Kelkfoje ŝi timas. Ŝi timas ne pri si mem sed pri Martin. Li estas ŝia sola filo.

“Ne skiu tro rapide, Martin”, ŝi diras. “Vi povas fali.”

“Kara Panjo, ne timu. Ne gravas, se mi falas. La neĝo estas mola.”

“Tute ne! Sur la deklivo ĝi estas malmola. Mi mem falis kelk-foje.”

“Do skiu pli malrapide, Panjo”, diras Martin.

Li ridas. Poste li glitas for sur la skioj. Katrina pensas. Ŝia filo ne plu estas knabo. Martin jam estas granda. Kelkfoje ŝi forgesas tion. Li estas juna viro. Sed Katrina mem ne plu estas juna virino. Ankaŭ tion ŝi kelkfoje forgesas.

Glosoj:

esperante / *angle* / *japane* / *koree*

(Literoj ^{A-F} montras oftecon de la radiko; ^A = plej ofta, ^F = plej malofta.)

dekliivo ^D grundo ne horizontala / *slope, hillside* / スロ-プ・
斜面 / 슬로프, 비탈

ferio ^Ĉ libera tago / *holiday* / 休日 / 휴일

ĝui ^Ĉ senti grandan plezuron de io / *enjoy* /楽しむ
/ 즐기다

mola ^Ĉ ne rezista al premo / *soft* / 柔らかい / 부드러운

onklo ^C frato de patro aŭ patrino / *uncle* / おじ/ (외)삼촌

panjo ^D karesa vorto por patrino / *mummy* / お母さん /
엄마 (어머니의 애칭)

ripozi ^C ne labori, ne fari ion, por mallaciĝi / *rest, relax* /
休息する / 휴식하다

skii ^E gliti sur neĝo / *to ski* / スキーで滑る/ 스키 타다

skio ^E tabulo por gliti sur neĝo / *a ski* / スキー / 스키

Svedio ^Ĉ lando en norda Eŭropo inter Norvegio kaj

Finnlando / *Sweden* / スウェーデン / 스웨덴

turisto ^Ĉ homo kiu vojaĝas pro plezuro / *tourist* / 旅行者
/ 여행객

vintro ^Ĉ mal-somero / *winter* / 冬 / 겨울

2. Muzika familio

Dum la tagoj la kvar familianoj skias sur deklivoj. En la vesperoj post la skiado ili muzikas. Fredrik kaj Erika estas muzikistoj, kaj Martin studas en la Muzika Alt-lernejo de Stokholmo. Li ludas fluton, Fredrik violonon kaj Erika klarneton. Nur Katrina ne ludas muzikilon, sed ankaŭ ŝi ŝatas muzikon.

“Kara Katrina”, diras Fredrik. “Bonvolu turni la paĝojn de la muzik-notoj por mi.”

“Bone. Mi faros”, diras Katrina. “Sed kiel mi povos scii, kiam estos tempo turni la paĝon? Mi ne scias legi la muzik-notojn.”

“Simple rigardu min. Mi palpebrumos al vi.”

“Ĉu vi palpebrumos al mia patrino?” diras Martin. “Tamen vi jam havas edzinon.”

Ili ĉiuj ridas.

“Katrina ja estas mia fratino”, diras Fredrik. “Do mi rajtas palpebrumi al ŝi.”

Unue ili ludas kelkajn svedajn kantojn. Poste ili ludas muzikaĵon de *Telemann*.

Katrina tre ĝuas la tagojn kun siaj familianoj. Ŝi ŝatas *kaj* la deklivan skiadon, *kaj* la vesperan muzikadon. Sed post sep tagoj ŝi reiras la longan vojon hejmen, pli ol okcent kilometrojn. Ŝi loĝas en Gotenburgo, ĉe la okcidenta mar-bordo de Svedio. Nun Martin studas en la ĉef-urbo Stokholmo, kvincent kilometrojn for de Gotenburgo. Li nur malofte revenas hejmen al sia patrino. Do Katrina loĝas sola tie. Ŝi ne havas kunloĝanton.

Glosoj:

fluto ^E blov-muzikilo el tubo kun truoj / *flute* / フルート /

플루트

Gotenburgo ^F dua urbo de Svedio (*Göteborg*) / *Gothenburg* / イ

エーテボリ / 고텐부르그

kilometro ^Ĉ 1 000 metroj / *kilometre* / キロメートル /

킬로미터

klarneto ^E blov-muzikilo el ligna tubo kun beko kaj klapoj

/ *clarinet* / クラリネット / 클라리넷

muziko ^Ĉ harmonia aranĝo de sonoj / *music* / 音楽 /

음악

muzik-notoj ^Ĉ .signoj por skribi muzikon / *musical notation* /

楽譜 / 악보

okcidento ^C ... direkto al la sun-subiro / *west* / 西 / 서쪽

palpebrumi ^E .. fermi kaj malfermi okulon / *blink, wink* / 目くば

せする / 눈을 깜박이다, 윙크하다

Stokholmo ^E .. La ĉefurbo de Svedio (*Stockholm*) // ストックホ

ルム / 스톡홀름

svedo ^Ĉ ano de nordeŭropa nacio inter Norvegio kaj

Finnlando / *Swede* / スウェーデン人 / 스웨덴인

violono ^E muzikilo kun kvar kordoj frotataj per arĉo /

violin / ヴァイオリン / 바이올린

3. Kara Katrina

La vintro pasis. Nun estas printempo. Katrina estas hejme en Gotenburgo. Ŝi laboras. Ŝi estas instruisto. Sed ŝia filo Martin estas en Stokholmo. Tie li studas muzikon. Do Katrina estas sola en sia loĝejo.

En unu tago ŝi ricevas leteron. Paperan leteron. Tio ne estas kutima. Kutime ŝi ricevas mesaĝojn per sia telefono aŭ komputilo. Papera letero ŝajnas veni el alia tempo. El la tempo, kiam ŝi estis juna.

La letero venas de Eddie. Tio vere estas nomo el alia tempo¹. Katrina renkontis kaj ekkonis lin en Bretonio antaŭ dudek unu jaroj. Tiam ŝi en-amigis al li. Jen kial ŝi nun havas dudek-jaran filon. Ŝi malfermas la leteron kaj eklegas:

Kara Katrina,

Mi esperas, ke vi ricevos ĉi tiun leteron. Eble vi ne plu loĝas ĉe la sama adreso kiel antaŭe. Sed mi konas nur ĉi tiun adreson.

Mi esperas, ke vi kaj Martin estas sanaj. Mi havas proponon al Martin por la somero. Dum julio kaj aŭgusto mia edzino kaj miaj infanoj estos en Bretonio. Sed dum julio mi mem restos en Parizo. Do mi volas demandi, ĉu Martin volas veni ĉi tien. Mi laboros dum julio. Tamen mi havos tempon por montri al li Parizon, se tio plaĉos al li. Li povos loĝi ĉe mi, en mia domo.

Kun koraj salutoj,

Edmond Kervella (Eddie).

¹ Legu pri Eddie en *Katrina malfruas*, la tria libreto pri Katrina.

Sub la letero Eddie skribis sian poŝtan adreson kaj ankaŭ la ret-poŝtan adreson. Do la letero ne venas el alia tempo.

Katrina tre miras. Dum momento ŝi koleras. Poste ŝi nur miras. Kial Eddie skribas nun, post tiel multaj jaroj? Kial li subite volas renkonti sian filon? Antaŭe li neniam volis tion.

Kiam Martin estis malgranda infano, Katrina sendis kelkajn leterojn al Eddie. Ŝi rakontis, ke ŝi naskis ilian filon. Sed unue Eddie tute ne respondis. Poste li sendis tre mal-longajn respondojn. Li skribis, ke li ne povas renkonti ŝin kaj ilian filon. Li havis alian kor-amikininon, kiu poste iĝis lia edzino. Do Martin ne povis renkonti sian patron. Li neniam ekkonis lin.

Katrina pensas, ke nun estas tro malfrue. Martin ne plu estas infano. Li ne plu bezonas patron.

Poste ŝi pensas pri la aliaj infanoj de Eddie. Ŝi ne konas ilin. Ankaŭ Martin ne konas ilin. Ili konas sian patron. Ili estas gefratoj de Martin. Sed li ne ekkonos ilin, eĉ se li vojaĝos al Parizo. Dum julio ili estos en Bretonio kun sia patrino. Eble ili estos en la loko, kie Katrina kaj Eddie renkontiĝis antaŭ multaj jaroj. La loko, kie Martin estiĝis.

Sed Katrina ne plu volas pensi pri tio. Tio okazis antaŭlonge. Tiam ŝi estis juna virino.

Ŝi volas for-ĵeti la leteron de Eddie, Edmond Kervella. Sed ŝi ne faras tion. Ŝi sendas ĝin al Martin. Ĝi estas invito al li, ne al ŝi. Li ne plu estas infano. Ŝi ne plu povas decidi pri li. Martin mem devas decidi, kion li volas fari.

Glosoj:

aŭgusto^C la 8-a monato / *August* / 八月 / 8 월

Bretonio^E Regiono en nord-okcidenta Francio (Bretagne) / *Brittany* / ブルターニュ / 브레토니아 지역

inviti^Ĉ peti iun veni ien / *invite* / 招待する / 초대하다

julio^C la 7-a monato / *July* / 七月 / 7 월

komput-ilo ^D . elektronika aparato por ĉiaspeca laboro /

computer / コンピュータ / 컴퓨터

mesaĝo ^D skriba sciigo / *message* / メッセージ / 메시지

Parizo ^E La ĉefurbo de Francio (*Paris*) / / 파리 / 파리

printempo ^C ... sezono antaŭ somero / *spring* / 春 / 봄

ret-poŝto ^{DC} elektronika poŝto / *e-mail* / Eメール / 이메일

4. Koramikoj

Katrina neniam edziniĝis. Dum multaj jaroj ŝi vivis sola kun sia filo. Tamen ŝi ja renkontis virojn. Kelkfoje ŝi enamiĝis. Pri Eddie, la patro de Martin, ŝi ne plu volas pensi.

De du jaroj ŝi havas kor-amikon, kiu loĝas en Gotenburgo, same kiel ŝi. Ili tamen ne kun-loĝas. Lia nomo estas Andreas, kaj li estas instruisto, same kiel Katrino. Fakte ŝi ekkonis lin en la lernejo, kie ŝi laboras. Do li estas ŝia kolego kaj koramiko sed ne kunloĝanto.

Andreas havas du infanojn, Love kaj Jonna. Love, la filo, aĝas dek kvin jarojn. Jonna, la filino, estas dek-tri-jara. Ĉiun duan semajnon ili loĝas kun sia patro. En la aliaj semajnoj ili loĝas kun sia patrino en alia loĝejo. En Svedio tio estas sufiĉe ofta kutimo. Kiam gepatroj disiĝas, la infanoj ofte loĝas jen ĉe la patro, jen ĉe la patrino.

Antaŭ dek kvin jaroj Katrino enamiĝis al junulo el Koreio. Tio okazis en Kopenhago, la ĉefurbo de Danio. Ŝi renkontis lin tie dum Esperanto-festivalo. Ili aŭskultis la muzikon, la paroladojn, la interparolojn. Ili amuziĝis, dancis, trinkis bieron. Kaj ili enamiĝis. Lia nomo estis Seong-ho, kaj li estis tre aminda junulo.

Katrino estis en la festivalo kun Martin, kiu tiam aĝis kvin jarojn. Sed tio ne gravis. Seong-ho ŝatis ankaŭ la filon de Katrino. Kelkfoje en vespero, kiam ili aŭskultis muzikon kaj dancis, Martin dormis sur sofo en la festivalejo.

Katrino kaj Seong-ho planis komunan vivon. Li estis pli juna ol ŝi, sed ankaŭ tio ne gravis. En Koreio li jam antaŭe studis juron, kaj nun li volis studi internacian juron en la universitato de Gotenburgo. En tiu kurso oni instruas en la angla lingvo, kaj la studentoj venas el multaj diversaj landoj.

Katrina kaj li planis kunloĝi en Gotenburgo. Sed la plano ne realiĝis.

“Kara Katrina, mi bedaŭras”, skribis Seong-ho al ŝi post kelka tempo. “Mi studos ne en Svedio sed en Seulo. Mi estas la sola filo de miaj gepatroj. Ili volas ke mi restu en Koreio. Ili esperas iam havi nepon. Korean nepon. Pardonu min, Katrina. Mi tute ne volis trompi vin. Ne koleru, mi petas.”

Kompreneble Katrina ne koleris. Sed ŝi malĝojis. Ŝi vere bedaŭris la finon de la afero. Seong-ho estis vere aminda junulo. Kaj ŝi ne volis resti sola por ĉiam. Sed kompreneble ŝi ne estis vere sola, ĉar ŝi ĉiam havis sian filon Martin. Kaj post kelka tempo ŝi ekkonis alian viron kaj denove enamiĝis. Fakte ŝi pli kaj pli malofte pensis pri la koreo Seong-ho. Kompreneble ŝi neniam forgesis lin. Ankaŭ la patron de Martin, la francon Eddie, ŝi neniam forgesis. Nek la germanon Bruno, kiun ŝi konis en sia junaĝo.² Sed ŝi ne povas vivi en memoroj. Ŝia vivo devas plu-iri.

Nun, de du jaroj, ŝi do havas novan koramikon. Tamen ili ne planas baldaŭ kunloĝi. Katrina jam delonge kutimas loĝi en sia propra loĝejo. Kaj Andreas devas pensi unue pri siaj infanoj. Kunloĝi ne necesas. Sufiĉas kun-esti dum kelkaj tagoj, vesperoj kaj noktoj.

Glosoj:

angla ^Ĉ la ĉefa lingvo de Usono kaj Britio / *English* / 英語 / 영어

biero ^Ĉ malforta alkoholaĵo el greno / *beer* / ビール / 맥주

danci ^Ĉ movi sin ritme laŭ muziko / *dance* / 踊る / 춤추다

² Legu pri Bruno en *La krimo de Katrina*, la unua libreto pri Katrina.

Danio^D lando inter Svedio kaj Germanio / *Denmark* / デンマーク / 덴마크

festivalo^Ĉ festa, distra aranĝo / *festival* / フェスティバル / 축제

franco^Ĉ ano de popolo en okcidenta Eŭropo / *Frenchman* / フランス人 / 프랑스인

inter-nacia^C .. kio rilatas al pluraj nacioj aŭ landoj / *international* / 国際的な / 국제적인

juro^D (scienco pri) leĝaro / *law* / 法律 / 법, 법률

kolego^D persono kun la sama profesio / *colleague* / 同僚 / 동료

Kopenhago^E .. ĉefurbo de Danio / *Copenhagen* / コペンハーゲン / 코펜하겐

Koreio^E duoninsulo inter Ĉinio kaj Japanio / *Korea* / 韓国 / 한국

koreo^E loĝanto de Koreio / *Korean* / 韓国人 / 한국인

kurso^Ĉ grupo, kiu lernas kune / *course* / コース・授業 / 강습, 수업

nepo^D filo de fil(in)o / *grandson* / 孫 / 손자

reala^Ĉ vera, ekzistanta / *real* / 本当の / 현실의, 실제의

semajno^B 7 tagoj / *week* / 週 / 주

Seulo^E ĉefurbo de Sud-Koreio / *Seoul* / ソウル / 서울

sofo^D komforta meblo, kie pli ol unu homo povas sidi / *sofa* / ソファ / 소파

trompi ĉ vole erarigi iun / *deceive, cheat* / だます /

속이다

universitato ĉ .centro de supera instruado kaj esplorado /

university / 大学 / 대학

5. Martin en Stokholmo

Antaŭ duon-jaro Martin ekstudis en la Muzika Altlernejo de Stokholmo. Estis tre malfacile trovi loĝejon en la ĉefurbo, sed li havis bon-ŝancon. Li povis ekloĝi ĉe sia maljuna avo Leo kaj ties edzino Tina. Iliaj infanoj Fredrik kaj Karin delonge ne plu loĝas ĉe siaj gepatroj, do Martin ricevis ĉambron en la domo de la geedzoj Levin kaj nun loĝas ĉe ili.

Leo Levin antaŭe estis pianisto kaj instruisto en la Muzika Altlernejo, sed nun li estas pli ol sepdek-jara pensiulo. Tamen li plu ŝatas ludi pianon. Ankaŭ Tina estas muzikisto. Ŝi ludas violonĉelon. Do ili ambaŭ tre ĝojas, ke la nepo de Leo studas muzikon. Pro tio ili ĉiuj ekhavis la kutimon muziki kune en vesperoj, kiam Fredrik vizitas la gepatrojn kun sia edzino Erika. Kelkfoje ankaŭ Katrina alvojaĝas por viziti ilin, sed ŝi ludas neniun muzikilon.

Gotenburgo estas la dua plej granda urbo de Svedio. La gotenburganoj ne ĉiam ŝatas la ĉefurbon Stokholmo. Aŭ eble ne plaĉas al ili la stokholmanoj. Sed Martin baldaŭ tre ŝatas sian novan loĝ-urbon. Gotenburgo situas ĉe rivero proksime al la okcidenta marbordo. Sed en Stokholmo, proksime al la orienta marbordo, estas eĉ pli multe da akvo, ĉar ĝi situas inter la lago *Mälaren* kaj la Balta Maro, sur aro da insuloj kaj duon-insuloj. Multaj pontoj kunligas la diversajn partojn de la urbejo. Kiam Martin estas libera, li ŝatas promeni laŭ la akvo kaj rigardi boatojn kaj ŝipetojn, kiuj kuŝas ĉe la bordo.

El Gotenburgo iras pramoj al Danio, kaj el Stokholmo oni povas vojaĝi prame al Finnlando kaj Estonio, aŭ per ŝipetoj al la multaj insuloj en la Balta Maro.

Plej multe Martin ŝatas promeni inter malnovaj dometoj en la suda urbo-parto kun vidaĵo al la akvo en la mezo de la urbo. Ankaŭ la Malnova Urbo estas vidinda, sed tie estas iom tro da

turistoj, li pensas. Li mem ja nun loĝas ĉi-urbe. Kompreneble li ne sentas sin stokholmano, sed li certe ne estas turisto.

La Muzika Altlernejo situas en la orienta parto de la ĉefurbo, plejparte en tute novaj konstruaĵoj. Martin trovas la studadon tre interesa kaj plaĉa. Oni instruas *kaj* muzikan teorion *kaj* praktikan muzikadon, kio por li signifas ludadon per fluto. Sed ne nur la instruado plaĉas al li. Eble same gravas renkonti kolegojn, aliajn studentojn de muziko. Kelkaj el ili fariĝas liaj bonaj amikoj.

Krome plaĉas al li la eblo ofte renkonti siajn parencojn, la avon Leo, la onklon Fredrik kaj iliajn edzinojn. La onklinon Karin li renkontas pli malofte, ĉar ŝi loĝas en *Örebro*, ducent kilometrojn pli okcidente. Antaŭe la sola familiano, kiun li renkontadis ĉiutage, estis panjo Katrina. La patron en Francio li ankoraŭ neniam vidis. Sed eble tio baldaŭ ŝanĝiĝos.

Kiam Martin legis la leteron de Eddie, la franca patro, li unue ne volis vojaĝi al Parizo por renkonti lin. Kial tiu patro sendas leteron nun, post dudek jaroj? Sed poste Martin relegis la leteron kaj komencis pri-pensi la aferon. Estus bele vidi Parizon. Kaj eble tiu patro, kiun li ne konas, tamen estas koninda. Martin ankoraŭ ne decidis, ĉu li vojaĝos aŭ ne. Sed li plu pripensas la proponon kaj verŝajne baldaŭ devos decidi kaj respondi al la patro Eddie.

Glosoj:

Balta Maro^E .. maro oriente de Svedio / *Baltic Sea* / バルト海 / 발트 해

boato^Ĉ malgranda akvo-veturilo / *boat* / ボート/ 보트

Estonio^E lando sude de Finnlando / *Estonia* / エストニア/ 에스토니아

Finnlando^D..... lando inter Svedio kaj Rusio / *Finland* / フィンランド / 핀란드

oriento^C mal-okcidento / *east* / 東 / 동쪽

pensio^E pago al maljunulo, kiu ne plu laboras /
(*retirement*) *pension* / 年金 / 연금

piano^E muzikilo kun kordoj, kiujn oni frapas per klavoj
/ *piano* / ピアノ / 피아노

ponto^Ĉ vojo trans akvon / *bridge* / 橋 / 다리, 교량

praktiko^Ĉ konkreta aplikado / *practice* / 実演 / 실행

pramo^E ŝipo por facile transveturigi homojn kaj veturilojn / *ferry* / 渡し舟・フェリー / 페리, 연락선

situi^E esti en loko / *be situated* / 位置する/ 위치하다

teorio^Ĉ abstrakta ĝenerala pensaĵo aŭ klarigo / *theory* /
理論 / 이론

violonĉelo^E ... granda violono tenata inter la genuoj / *cello* / チェロ / 첼로

6. Komenco de la ferioj

En la komenco de junio finiĝas la printempa semestro de ĉiuj svedaj lernejoj. Komenciĝas la ferioj de Martin, kaj li revenas al panjo Katrina en Gotenburgo.

“Ĉu vi jam decidis pri Eddie kaj Parizo?” demandas Katrina, kiam li alvenas de Stokholmo.

“Jes, mi inter-konsentis kun li”, respondas Martin. “Mi vojaĝos tien en la fino de julio.”

Li ne volas diri “patro” aŭ “paĉjo”. Li ne vere sentas ke tiu franca viro estas lia patro. Ĝis nun li konis nur patrojn de siaj amikoj kaj aliaj homoj.

“Bone”, diras Katrina. “Estas bone ke vi renkontos lin, mi supozas, eĉ se tio okazos tro malfrue.”

“Nu, mi esperas ke vi pravas. Ĉiu-okaze mi havos okazon rigardi Parizon. Tio estos bona.”

Ankaŭ la lernantoj de Katrina ferias. Ŝi mem tamen devas plu labori iom pri planado de la aŭtuna semestro. Krome ŝi instruas en somera kurso por lernantoj, kiuj ne bone sukcesis dum la semestro.

Ankaŭ Martin laboras dum kelkaj semajnoj en la komenco de la somero. De kelkaj jaroj li kutimas somere labori en gotenburga kafejo. Tie li kuiras kafon, faras buter-panojn kaj aliajn manĝetojn kaj servas la gastojn. Ĝi estas ĝardena kafejo kun tabloj sub libera ĉielo. Tial ĝi havas plej multajn gastojn en bela vetero, kiam la suno brilas. En pluvo kaj vento ĝi ne havas gastojn. Do Martin devas labori en sunaj tagoj, sed en pluvaj tagoj li estas sen-labora kaj restas hejme en la loĝejo de panjo Katrina. En tiaj tagoj li kelkfoje ekzercas sin pri flutado. En aliaj okazoj li nur ripozas.

“Estas bedaŭrinde, ke vi neniam povas iri al strando en bela vetero por esti en la suno kaj bani vin”, diras Katrina.

“Nu, ne gravas. Mi delonge kutimas je tio.”

En la mezo de julio Katrina pasigas semajnon kun sia koramiko Andreas kaj liaj infanoj en lia velboato. Ili velas norden de Gotenburgo laŭ la marbordo, inter la multaj insuloj. Post tri tagoj ili venas al la norvega urbo *Halden*.

“Ni povus pluiri eĉ ĝis Oslo”, diras Andreas. “Sed por tio ni bezonus pli da tempo. Kaj la infanoj tediĝas jam post kelkaj tagoj en la boato. Ili trovas ĝin tro malgranda.”

“Ne gravas”, diras Katrina. “Mi jam plurfoje vizitis Oslon kun Martin. Poste vi kaj mi povos iri tien du-ope, sen la infanoj. Ne per la velboato, sed aŭte aŭ trajne.”

“Jen bona ideo”, diras Andreas. “Post du semajnoj la infanoj estos ĉe sia panjo. Tiam vi kaj mi povos pasigi kelkajn tagojn duope en Oslo. Aŭ ie ajn aliloke. La loko ne tre gravas. Gravas ĉefe kunestadi kun vi sen la infanoj.”

“Ŝajne ankaŭ vi tediĝas”, diras Katrina. “Tamen ne de la boato sed de la infanoj.”

Sed al tio Andreas nur ridas. Ili ambaŭ scias, ke li amas siajn infanojn.

Glosoj:

butero ^Ĉ graso el lakto / *butter* / バター / 버터

ekzerci ^D lertigi (sin aŭ alian) per praktika ripetado /
exercise / 訓練する・練習させる / 연습하다, 훈련하다

fluti ^E ludi per fluto / *play the flute* / 플루트를吹く/
플루트를 불다

ĝardeno ^E parketo, tero kun plantoj / *garden* / 庭 / 정원

junio ^Ĉ la 6-a monato / *June* / 六月 / 6 월

norvego^E ano de nacio okcidente de Svedio / *Norwegian* /
ノルウェー / 노르웨이인

-ope^Ĉ en grupo(j) de, kune, (du-ope = du -oj kune) / *at a time, together* / 組になって / 집합으로, 조가 되어 (du-

ope: 二人連れで) / 2 인조로

Oslo^E Ĉefurbo de Norvegio (*Oslo*) // オスロ / 오슬로

paĉjo^D karesa vorto por patro / *daddy* / お父さん / 아빠
(아버지의 애칭)

semestro^E duonjara studotempo / *semester, term* / 学期 /
학기

strando^E parto de mara aŭ laga bordo, kie konvenas bani
sin / *beach* / 砂浜 / 해변, 바닷가

teda^D malinteresa / *boring, tedious* / 退屈な / 지루한

trajno^Ĉ vagonaro / *train* / 列車 / 기차

veli^Ĉ veturi per helpo de velo / *to sail* / 帆走する/

돛을 달고 항해하다, 서핑하다

velo^Ĉ tolo, kiu per la vento pelas boaton / *a sail* / 帆 /
돛

7. Velado reen

En *Halden* Katrina, Andreas, Love kaj Jonna vizitas malnovan kastelon. Tie la sveda reĝo Karlo la dek-dua antaŭ tricent jaroj mortis pro pafo al la kapo, kiam li volis igi Norvegion parto de Svedio. La plen-kreskuloj trovas tion pli interesa ol la infanoj, kiuj preferas rigardi siajn telefonojn ol la kastelon, dum ili paŝas inter la malnovaj muroj.

Poste estas tempo por reiri suden. Dum ili iris norden de Gotenburgo al *Halden*, la vetero estis bela kun suno kaj vento sufiĉa por velado. Nun, kiam ili ekiras suden, ne plu estas vento. Ne eblas veli, do ili devas iri per la motoro. Baldaŭ ili revenas sur svedan akvon. Posttagmeze ili atingas la insulon *Pinnö*.

“Ni povos tra-nokti en la haveno de *Fjällbacka*”, proponas Andreas.

“En ordo”, diras Katrina. “Sed rigardu tie! Iu provas veli sen vento.”

Efektive meze de la mar-kolo estas boato pli-malpli sen-mova kun veloj, kiuj ŝajnas tute vanaj, ĉar ili kaptas neniom da vento.

“Ni demandu, ĉu oni bezonas helpon”, diras Andreas.

Katrina sidas ĉe la stirilo, do ŝi stiras ilian velboaton tien.

“Hej!” vokas Andreas al la alia boato. “Ĉu vi havas problemon?”

Aperas juna viro kun nigra ĉapo.

“La motoro haltis”, li diras norvege. “Ĉu vi povas treni nin?”

“Mi pensas ke jes. Verŝajne la haveno de *Grebbestad* estas plej proksima.”

“Ne, ne”, krias la junulo. “Ni iros norden. En Norvegion.”
Andreas ridas.

“Bone, sed ni ne povos treni vin tien. Ni iras suden. Al *Fjällbacka*, kaj poste pluen al Gotenburgo.”

Tio ŝajne kolerigas la viron.

“Damne! Ni devas iri norden. Trenu nin en Norvegon!”

Aperas dua viro apud li, kaj ili inter-parolas mallaŭte. Ne eblas aŭdi, kion ili diras inter si.

“Se vi ne volas iri al *Grebbestad*, prefere alvoku la policon por peti helpon”, diras Andreas. “Ĉu vi havas telefonon? Se ne, ni povas telefoni al la polico por vi.”

“Ne, ne! Damne ne!”

“Bone, do ni plu-iros suden. Eble ekblovos vento vespere, tiel ke vi povos veli plu norden.”

La dua viro malaperas, la unua plu aspektas kolera, sed Katrina jam stiras la velboaton de Andreas for de la alia boato.

“Tiuuj uloj ŝajnis ne ordinaraj turistoj”, ŝi poste diras.

“Ili certe estas krimuloj”, diras Love. “Mi scivolas, kion ili portas al Norvegio.”

“Ankaŭ mi. Ĉu ni telefonu al la polico?” demandas Andreas.

“Mi pensas ke ne”, diras Katrina. “Homoj estas malsamaj. Tio ne estas krimo. Eble ili ege volas veni hejmen en Norvegon, simple.”

Estas klare, ke Andreas kaj Katrina proponis sian helpon vane. Do ili pluiras motore suden kaj albordiĝas en la haveno de *Fjällbacka*. Tie estas multaj norvegaj velboatoj kaj motor-boatoj, sed ĉiuj homoj en ili ŝajnas ordinaraj turistoj. Katrina kaj la aliaj neniam ekscias, ĉu la strangaj norvegoj estis krimuloj aŭ ne.

En la sekva tago ekblovas vento ne tre forta, kiu ebligas veli plu suden. Kaj post unu plia tranoktado en insula haveno ili albordiĝas en Gotenburgo.

Kiam Katrina revenas hejmen, estas tempo por Martin ekiri al Francio. Li flugos rekte de Gotenburgo al Parizo.

“Zorge atentu pri via mono kaj aliaj valoraj aferoj en la flug-havenoj kaj poste sur la stratoj de Parizo”, diras Katrina. “Mi timas ke estas multe da poŝ-ŝtelistoj tie.”

Martin ridas.

“Ne timu, panjo. Mi ne plu estas infano.”

Katrina rigardas lin. Fakte, li jam estas viro. Ŝi ofte forgesas tion.

“Mi scias”, ŝi diras. “Tamen atentu, mi petas.”

Glosoj:

damni^D doni al la infero / *damn* / 地獄に落とす /

저주하다, damne 제기랄

ĉapo^E kapvestaĵo / *cap* / 帽子・キャップ / 챙없는 모자

haveno^Ĉ loko, kie ŝipoj albordiĝas / *harbour* / 港 / 항구

hej!^E krio por alvoki, kuraĝigi / *hey!* / おーい!・ちよつ
と! / 헤이!

kastelo^D fortikigita domo / *castle* / 城 / 성

krimo^Ĉ malbona ago, kiun oni punas / *crime* / 罪・犯罪 /
범죄

motoro^Ĉ aparato por movi / *motor* / モーター / 모터

plen-kreska^{AB} ne plu infano / *grown-up* / 成人した / 성인의

stiri^E direkti veturilon / *steer* / 操縦する・運転する /

조종하다, 운전하다

treni^E peze tiri post si / *drag* /引っ張る / 끌다

vana^D senrezulta, senutila / *futile* / 虚しい・無駄な /
헛된, 쓸데없는

8. Renkonti la patron

Martin alvenas en la flughavenon *Charles de Gaulle* norde de Parizo. Li tuj komprenas ke tio estas grandega flughaveno. Li devas veturi per loka aŭtobuso al alia parto de la haveno, kie estas stacio de fer-vojo. Tie atendos lin lia patro, kiun li ne konas.

Martin serĉas inter la homoj, kiuj plenigas la ejon. Kiel li povos trovi sian patron, kiun Katrina ĉiam nomas “Eddie”? Jen unu viro tenas paperon per ambaŭ manoj. Sur la papero Martin legas sian nomon: MARTIN MANSSON. Bone, do. Mankas nur la eta ringo super la A de lia familia nomo. Kompreneble li havas la familian nomon de sia patrino Katrina Månsson, ne de la patro Edmond Kervella, kiu mankis dum lia tuta vivo ĝis nun. Kaj Katrina havas la familian nomon de sia patrino Martina Månsson, ne de sia patro Leo Levin, kiu mankis dum granda parto de ŝia vivo.

Nu, pensas Martin, fakte gravas ne la nomoj sed la homoj. Kaj Eddie aspektas sufiĉe amika. Li parolas al Martin en la angla lingvo kun malforta franca akĉento. Martin respondas en la angla kun malforta sveda akĉento. Nenia problemo, do.

Rapidaj trajnoj iras de la flughaveno en la centron de Parizo, sed Martin kaj Eddie ne vojaĝas per tia trajno. Eddie alvenis ĉi tien per sia aŭto, kaj nun li reiras aŭte kun Martin. Ili vojaĝas preskaŭ dum horo sur aŭto-vojoj al la hejmo de Eddie en *Poissy* okcidente de Parizo. Dum li stiras la aŭton, li rakontas pri la historio de la regiono.

“La unuaj parizanoj estis kelta popolo, kiu donis sian nomon al la urbo”, li diras. “Poste aperis la romianoj, kiuj batalis kontraŭ la keltoj. Vi eble konas *Asterikson*.”

“Jes, sed tio estas fantazio, ĉu ne?”

“Tamen kun iom da vero sub la fantazio.”

La hejmo de Eddie estas unu-familia dometo ĉe trankvila strato. Apud la domo estas malgranda ĝardeno. Li montras al Martin ĉambron kaj diras:

“Jen la dormo-ĉambro de miaj infanoj. Ili nun estas en Bretonio kun sia patrino. Do vi dormos ĉi tie.”

Li ne diris “la ĉambro de viaj gefratoj”, pensas Martin. Fakte ĝis nun Eddie diris nenion pri tio, ke ili estas familianoj. Kaj neni el ili diris ion pri Katrina.

“Nu, mi montros ankaŭ la ban-ĉambron”, diras Eddie. “Poste mi sur-tabligos ian simplan vesper-manĝon. Bedaŭrinde mi ne estas tre bona kuiristo.”

Do, post duonhoro ili ambaŭ sidas ĉe tablo en la manĝo-ĉambro, kie Eddie metis diversajn malvarmajn manĝaĵojn sur la tablon: viandon, salaton, fromaĝon, panon. Kaj krome ruĝan vinon.

“Ĉu vi eble preferas bieron?” li demandas. “Mi ne scias, kion ŝatas svedoj.”

Verŝajne li ja scias, kion ŝatis svedino antaŭ dudek unu jaroj, pensas Martin. Sed li ne diras tion.

“Dankon, ne gravas”, li respondas. “Mi ŝatas *kaj* vinon *kaj* bieron.”

Glosoj:

akĉento^E aparta elparolo / *accent* / なまり/ 악센트, 억양

fantazio^D kaprica elpenŝaĵo / *fantasy* / ファンタジー·空想 / 환상, 공상

fero^Ĉ la plej uzebla metalo / *iron* / 鉄 / 철

fromaĝo^D manĝaĵo el kazeigita lakto / *cheese* / 치즈 / 치즈

kelto^E ano de popolo, kiu iam vivis en centra kaj okcidenta Eŭropo / *Celt* / 켈트인 / 켈트인

ringo^D..... cirkloforma peco / *ring* / 丸・指輪 / 둥근
고리, 반지

Romio^E la Roma imperio / *the Roman Empire* / ローマ帝
国 / 로마제국

salato^D..... manĝaĵo el diversaj legomoj kaj alio / *salad* / サ
ラダ / 샐러드

stacio^Ĉ..... grava haltejo de trafikiloj / *station* / 駅 / 역
sur-tabl-igi^{AB} meti sur la tablon / *put on the table, serve* /
テーブルに置く / 탁자 위에 놓다

9. Martin en Parizo

Matene Eddie veturas aŭte kun Martin al sia laborejo. Li laboras en granda arkeologia muzeo en la apuda urbo *Saint-Germain-en-Laye*.

“Mi devas labori dum momento”, li diras. “Eble unu aŭ du horojn. Sed ĝi estas tre vizit-inda muzeo. Vi povus pasigi kelkajn tagojn tie. Poste mi montros al vi Parizon.”

Sur-voje al la muzeo ili veturas tra granda arbaro. Dum momento Martin pensas, ke li preferus ekskursi en tiu arbaro. Muzeoj plenaj de malnovegaj aferoj ne tre interesas lin en la ferioj. Sed li ne povas diri tion al sia patro, la franca arkeologo.

Fakte la muzeo estas plena de malnovegaj aferoj. Hakiloj el la ŝtona epoko. Ringoj el la bronza epoko. Taso kaj moneroj el la fera epoko, kiam keltoj loĝis en ĉi tiu regiono. Sed plej multe da aferoj el la tempo, kiam romianoj regis la tutan landon, kiu poste fariĝis Francio. Kelkaj aferoj ja estas interesaj, sed Martin forte esperas, ke li ne devos pasigi tagojn en la muzeo.

Post tag-manĝo en apuda restoracio, ili veturas trajne en la centron de Parizo. Kaj tie Eddie promenigas ilin inter famaj preĝejoj, famaj palacoj kaj muzeoj, aliaj famaj lokoj, kaj fine ĝis la famega Ejfel-turo, kiun devas viziti ĉiu turisto en Parizo. Vespere Martin estas lacega, kiam ili revenas al *Poissy*. Post mallonga ripozo ili manĝas krespojn kun fromaĝo, kiujn kuiris Eddie.

“Jen bretonaj krespoj”, li diras. “Mi estas bretono, do mi scias kuiri tion. Morgaŭ mi bedaŭrinde devos labori. Sed nun vi jam scias, kiel veturi al la urbocentro, ĉu ne? Vi ja estas plenkreska viro, ne infano.”

Martin konsentas. Li povos plu viziti la vidindaĵojn de Parizo sen helpo de sia patro. Eble eĉ promeni en la franca arbaro. Aŭ en pariza parko.

Kaj tiel fakte okazas. Eddie montras al li sur mapo, kie li trovos vidindajn lokojn. Famajn urbo-partojn, stratojn kaj pontojn. Do Martin alveturas trajne kaj poste promenas inter amaso da aliaj turistoj, kiuj parolas angle, germane, itale, ĉine, eĉ svede. Kaj france, kompreneble.

Sur unu strato, en la universitata urboparto sur la maldekstra river-bordo, amaso da turistoj rigardas junulojn, kiuj faras artifikaĵojn por kolekti monon. Tie Martin ekvidas viron, kiu alproksimiĝas, ŝajne por ŝteli ion de la turistoj.

“Atentu! Poŝ-ŝtelisto!” krias Martin en la angla.

Kelkaj turistoj turnas sin kaj rigardas maltrankvile. La ŝtelisto rapide malaperas, kaj Martin memoras la atentigon de panjo Katrina. Do ŝi fakte pravis, li pensas. Tio estas surprizo.

Finfine li tamen plej ŝatas promeni en lokoj tute ne famaj sed ordinaraj, kie li eble eĉ estas la sola turista. Bedaŭrinde li ne parolas france, sed tio ne gravas. Per iom da angla kaj iom da movoj per la manoj li trovas sian vojon kaj eĉ sukcesas tagmanĝi en simpla kafejo. Kiam li vespere revenas al sia patro, li povas diri tute certe:

“Parizo tre plaĉas al mi.”

Glosoj:

arkeologio^E ... scienco pri prahistoriaj trovaĵoj / *archaeology* / 考古学 / 고고학

arkeologo^E sciencisto de arkeologio / *archaeologist* / 考古学者 / 고고학자

artifiko^E lerta ago por imponi aŭ trompi / *trick* / トリック・マジック / 속임수, 책략

bretono^E..... persono el Bretonio / *Breton* / ブルターニュ人・ブレ
トン人 / 브르타뉴 사람

bronzon^D..... metalo, alojo el kupro kaj stano / *bronze* / 青銅
/ 청동

ĉino^D..... ano de la plej granda orientazia nacio / *Chinese
person* / 中国人 / 중국인

ekskurso^Ĉ..... mallonga vojaĝo pro plezuro / *excursion* / 遠足
/ 관광, 소풍

epoko^Ĉ..... periodo en la historio / *epoch, age* / 時代 /
시대

germano^Ĉ..... ano de granda eŭropa nacio inter Pollando kaj
Nederlando / *German* / ドイツ人 / 독일인

haki^D..... bati por tranĉi aŭ disigi / *cut, chop* / 斧で切る/
도끼질하다,

italo^D..... ano de sudeŭropa nacio / *Italian* / イタリア人/
이탈리아인

krespo^E..... maldika patkuko / *crêpe* / クレープ / 크레페 빵

mapo^Ĉ..... desegno de (parto de) lando, urbo aŭ de la
mondo / *map* / 地図 / 지도

muzeo^Ĉ..... ejo, kie oni publike montras kolektojn / *museum* /
美術館・博物館 / 박물관, 미술관

palaco^Ĉ..... luksa domo / *palace* / 宮殿 / 궁, 궁전

parko^Ĉ..... terpeco kun herbejoj, arbustoj, arboj, floroj por
plezuro / *park* / 公園 / 공원

preĝi^Ĉ..... paroli al dio / *pray* / 祈る / 기도하다

preĝ-ejo ^Ĉ domo por religiaj agoj, precipe kristanaj /

church / 教会 / 교회

restoracio ^D ...ejo, kie oni manĝas kontraŭ pago / *restaurant* /

レストラン / 레스토랑

surprizi ^Ĉ mirigi per io neatendita / *surprise* / 驚かせる /

놀라게하다

taso ^Ĉ eta trinkujo kun tenilo / *cup* / カップ / (손잡이

달린) 찻잔

turo ^D konstruaĵo multe pli alta ol larĝa / *tower* / 塔 /

탑

10. Manifestacioj

Eddie pasigas unu plian tagon kun Martin en Parizo, sed dum la aliaj tagoj li laboras. Sabate Martin sidas sola en kafejo ĉe granda strato en la urbocentro. Tiam preter-pasas manifestacio el kelkaj miloj da homoj, kiuj krias kaj kantas, sed Martin komprenas nenion. Fine alia gasto klarigas al li en ne tre bona angla lingvo:

“Oni protestas kontraŭ la registaro, kiu volas sen-laborigi kelkajn milojn da personoj el ŝtataj laborejoj kaj nuligi du feriojn. Sed espereble la parlamento ne akceptos tiun planon.”

Krome Martin ekscias, ke kelkaj el la manifestaciantoj planas pliajn protestajn agojn.

“Ili volas bloki ĉion”, klarigas la alia kafeja gasto mal-rapide. “Transportojn, vojojn, laborejojn. Por montri ke ili ne akceptas la politikon de *Macron* kaj *Bayrou*, tio estas de la nunaj gvidantoj.”

Martin dankas pro la klarigo kaj miras, kiel malsame homoj agas ĉi tie ol en Svedio. Ankaŭ tie oni iam nuligis unu ferion. Sed la svedoj ne estas tre protestemaj, li pensas.

Dum preskaŭ unu horo la strato estas plena de homoj, kiuj manifestacias. Martin trinkas duan glason da biero, dum li rigardas ilin. Ankaŭ ĉi tio estas pariza vidindaĵo, li pensas. Poste li promenas ĝis la rivero Sejno. En kelkaj lokoj oni aranĝis tiel ke eblas bani sin kaj naĝi en la rivero. Dum kelka tempo li rigardas homojn, kiuj naĝas en unu el tiuj lokoj apud la insulo *Saint-Louis* en la urbocentro. Sed li mem ne kunportis banveston. Krome li timas ke la akvo de Sejno eble ne estas tre pura.

En Gotenburgo Katrina kaj Andreas sabate ekskursas kun du geamikoj per la velboato. Estas la juna virino Gloria, kiu iam

antaŭlonge estis lernanto de Katrina, kaj ŝia edzo Dan. Ili velas al insulo ne malproksime de Gotenburgo, kie ili banas sin en la maro kaj ripozas en la suno ĉe la marbordo.

“Estas strange”, diras Katrina. “Ĉi tie nenio ĝenas aŭ timigas nin. Estas plena paco. Sed ĉirkaŭe en la mondo oni mortigas homojn amase.”

“Eĉ infanojn”, diras Dan.

Tiam Gloria rakontas, ke ŝi kaj Dan morgaŭ parto-prenos en manifestacio.

“Ni manifestacios por la homoj en Gazao”, ŝi diras. “Por la infanoj. Ne eblas akcepti ke oni mortigas malsatajn infanojn, kiuj vico-staras por ricevi manĝaĵon.”

Katrina konsentas sed ne certas, kion pensi pri la manifestacio. Ŝi ne kutimas partopreni en tiaj aranĝoj. Tamen ankaŭ ŝi trovas, ke la ĉiutagaj novaĵoj el Gazao estas teruraj.

“Ĉu vi certas, ke ĝi estos paca?” ŝi demandas.

“Kompreneble. Ĝi estos manifestacio por paco. Ĉeestos ankaŭ Ella, nia filino, kaj eble mia patro.”

Andreas ne volas partopreni, sed Katrina dimanĉe iras al loko en la urbocentro, kie kolektiĝas kelkaj centoj da homoj. Ŝi rigardas la multajn palestinajn flagojn kaj aŭskultas la paroladojn. Poste ŝi paŝas kun Gloria kaj Dan ĝis la fino de la manifestacio. Ĉio okazas tre trankvile, kaj verŝajne la plej multaj urbanoj rimarkis nenion. La filino de Gloria kaj Dan tamen ne venis. Ŝi preferis resti hejme super sia telefono.

“Ella pensas ke ne indas paŝi surstrate kun flagoj”, klarigas Dan.

“Nu, ankaŭ mi timas, ke ĉi tio ne multe helpas la homojn en Gazao”, diras Katrina.

“Tamen necesas fari ion, ĉu ne?” diras Gloria. “Ni devas montri al aliaj homoj, ke palestinaj vivoj gravas. Kaj ni en Eŭropo devus helpi kaj subteni la palestinanojn same kiel ni helpas la ukrainojn.”

“Vi pravas. Ankaŭ la belorusojn ni devus helpi, sed mi ne scias kiel. Ĉu vi plu havas kontakton kun Halina?”

“Preskaŭ ne plu, bedaŭrinde. Eble pasis du jaroj de nia lasta kontakto.”

Katrina memoras la vojaĝon, kiun ŝi faris kun Gloria antaŭ pli ol dudek jaroj por retrovi la belorusan knabinon Halina en Pollando.³ Kiel rapide la jaroj pasis!

Glosoj:

beloruso ^E ano de nacio inter Rusio kaj Pollando /

Belarusian / ベラルーシ人 / 벨라루스 인

bloki ^E tute bari kaj malhelpi / *block* / 封鎖する/

차단하다, 막다

flago ^Ĉ tuko kiel simbolo de lando / *flag* / 旗 / 깃발

Gazao ^E palestina havenurbo / *Gaza* / 가자 / 가자 지역

gvidi ^Ĉ montri al iu, kien iri aŭ kion fari / *guide* / 案内

する・指導する / 안내 (지도)하다

kontakto ^D interrilito / *contact* / 接触・連絡 / 접촉, 연락

manifestacio ^E aro da homoj, kiuj surstrate montras opinion /

demonstration / 데모/ 데모, 집회

nul ^D 0, nenio / *zero, nil* / 제로

Palestino ^E lando en Mezoriento apud Israelo / *Palestine* /

팔레스티나/ 팔레스타인

parlamento ^D .. aro da homoj elektitaj por fari leĝojn kaj aliajn

tutlandajn decidojn / *parliament* / 議會・国会 / 국회

politiko ^Ĉ regado de ŝtato / *politics* / 政治 / 정치

³ Legu pri Gloria kaj Halina en *Vojaĝo kun Katrina*, la dua libreto pri Katrina.

Pollando lando inter Germanio kaj Belorusio / *Poland* /

ポーランド / 폴란드

protesti ^Ĉ firme kontraŭdiri / *protest* / 抗議する/

항의하다

sabato ^Ĉ sesa tago de la semajno, inter vendredo kaj

dimanĉo / *Saturday* / 土曜日 / 토요일

Sejno ^E rivero en Parizo (*Seine*) // セーヌ川 / 세느강

ukraino ^E ano de nacio inter Rusio kaj Nigra Maro /

Ukrainian / ウクライナ人 / 우크라이나인

11. La tasko de Martin

Estas tempo reiri al Svedio. Fakte Martin ne tre bone ekkonis sian patron. Verŝajne ne facilas en unu semajno refari tion, kio mankas de dudek jaroj. Krome Eddie dum la tagoj plej ofte estis en sia laborejo, dum Martin vizitis Parizon sola. Sed nun la patro promesis veturigi sian filon aŭte al la flughaveno.

“Martin, vi ja studas en Stokholmo, ĉu ne?” diras Eddie, dum Martin plenigas sian valizon.

“Jes, en la Muzika Altlernejo.”

“Bone. Ĉu vi povus porti malgrandan paketon al mia kolego kaj amiko, kiu laboras en la Historia Muzeo de Stokholmo?”

“Nu, mi supozas ke jes.”

“Ĝi enhavas kelkajn keltajn monerojn, kiujn mi aĉetis por li en Bretonio. Mi ne volas sendi ilin poŝte. Tio ne estas sekura. Sed prefere ni metu la paketon en vian valizon, por ke oni ne ĝenu vin en la sekurec-kontrolo.”

Martin miras, ke Eddie trovas lian valizon pli sekura ol la poŝto. Sed li ne povas diri, ke li ne volas helpi la patron. Do ili metas la malgrandan paketon inter liajn vestaĵojn kaj fermas la valizon. Poste ili ekiras per la *Peugeot* de Eddie.

“Ĉi tie oni fabrikis mian aŭton”, rakontas Eddie, kiam ili veturas preter vasta fabriko en *Poissy*.

En la flughaveno Martin dankas pro la gastigado.

“Ne dankinde. Sed ne forgesu porti la monerojn al mia amiko Holger Brolin. Memoru doni ilin al li persone. Li atendos vin.”

“Certe. Nenia problemo.”

Kaj ili disiĝas. Ĉu ili iam revidos unu la alian? Martin ne certas. Morgaŭ komenciĝos la ferioj de Eddie. Tiam li vojaĝos al Bretonio, al siaj edzino kaj infanoj. Tio estas al siaj *veraj*

infanoj, pensas Martin. Li mem ne sentas ke li estas vera filo de Eddie.

Kiam Martin revenas al Gotenburgo, li havas du liberajn semajnojn. La unuan li pasigas kun panjo Katrina, interalie en la velboato de Andreas. La vetero tamen ne estas belega. Poste Katrina kaj Andreas devas labori pri preparoj antaŭ la aŭtuna semestro de la lernejo. Tiam Martin iras trajne al Stokholmo.

Avo Leo kaj Tina akceptas lin amike, kiam li revenas al sia ĉambro en ilia domo. Tie li sentas forte, ke ili estas liaj familianoj.

En la dua tago en Stokholmo li veturas al la Historia Muzeo por transdoni la paketon al la kolego kaj amiko de Eddie. Sed tiam atendas lin surprizo.

“Ne”, diras virino en la muzeo, “Holger Brolin ne ĉeestas.”

Ŝi faras strangan mienon, ŝajnas al Martin.

“Do, kiam li revenos?” li demandas. “Mi havas paketon kun kelkaj malnovaj moneroj por li.”

“Bonvolu atendi momenton.”

La virino malaperas, kaj Martin atendas. Post du minutoj ŝi revenas.

“Bonvolu veni paroli kun la ĉefo”, ŝi diras.

“Ne necesas. Mi povos reveni en alia tago.”

“Tamen venu, mi petas. La ĉefo klarigos.”

Ŝi tuŝas lian brakon kaj montras, ke li sekvu ŝin en alian ĉambron. Martin trovas tion iom stranga.

La ĉefo estas maldika viro pli-malpli sesdek-jara. Li sidas malantaŭ granda skrib-tablo plena de paperoj.

“Bonvolu sidi”, li diras.

“Fakte mi volis nur doni ion al Holger Brolin.”

“Mi komprenas. Kiu vi estas?”

“Mia nomo estas Martin Månsson. Mi estas studento de muziko.”

“Kion vi volis doni al li?”

“Paketon kun kelkaj malnovaj keltaj moneroj de mia patro.”

La ĉefo malrapide kap-jesas.

“Sed mi povos reveni, kiam li ĉeestos”, aldonas Martin.

“Kiu estas via patro?”

“Ĉu tio gravas? Li estas franca arkeologo. Edmond Kervella. En Parizo.”

Estiĝas paŭzo en la stranga interparolo. Martin komprenas nenion kaj volas nur foriri. Kial ĉi tiu muzea ĉefo pri-demandas lin preskaŭ kiel policisto?

“Se mi ekscios la hejman adreson de Holger Brolin, mi povos serĉi lin tie”, li diras kaj ekstaras.

“Bonvolu residiĝi. Vi ne trovos lin hejme. Mi devas peti vin atendi ĉi tie, aŭ identigi vin kaj lasi la monerojn. Ili certe interesos la policon.”

Glosoj:

fabriko ^Dejo, kie oni produktas per maŝinoj / *factory* / 工場 / 공장

ident-igi ^Emontri, precize kiu aŭ kio estas iu aŭ io / *identify* / 身元を確認する / 신원을 확인하다

mieno ^Ĉesprimo de la vizaĝo / *look, expression* / 表情 / 표정

sekura ^Ĉsendanĝera, protektata / *safe* / 安全な / 안전한

valizo ^Dport-sakego, kesto kun tenilo por kunporti aĵojn / *suitcase* / 旅行カバン / 여행용 가방

12. Polica esplorado

La Historia Muzeo de Stokholmo havas grandan kolekton de moneroj el malnova tempo. Kelkaj estas romiaj moneroj, kiujn per-laboris soldatoj el norda Eŭropo, kiam ili servis en la romia armeo en la kvara kaj kvina jarcentoj. Aliaj estas arabaj moneroj, kiujn vikingoj alportis antaŭ pli ol mil jaroj. Kaj aliaj estas la unuaj svedaj moneroj el la deka jarcento. Kelkajn monerojn oni montras al la vizitantoj de la muzeo, sed la plej multaj kuŝas en magazeno.

Antaŭ kelka tempo oni trovis, ke mankas moneroj en la magazeno, sed oni ne povis scii, kiel aŭ kiam ili malaperis. Komenciĝis esplorado, unue fare de la homoj, kiuj laboras en la muzeo, sed poste ankaŭ de la polico. Per helpo de kelkaj personoj, kiuj kolektas malnovajn monerojn, oni ekhavis spuron. Iuj el la moneroj aperis en aliaj landoj, kie kolektantoj aĉetis ilin per Interreta paĝo. Post longa spurado oni trovis, ke la vendanto estas Holger Brolin, kiu laboras en la Historia Muzeo de Stokholmo. Fine la polico kaptis lin, kelkajn tagojn antaŭ la vizito de Martin en la muzeo.

Katrina vojaĝis al Stokholmo vendrede vespere. Nun ŝi renkontas sian filon en la hejmo de lia avo. Dum la vojaĝo tien ŝi estis tre maltrankvila, sed nun ŝi ĝojas ekvidi lin inter Leo kaj Tina en ilia kuirejo.

“Kia terura okazaĵo!” ŝi ekkrias. “Sed ĉu ĉio nun estas en ordo? Ĉu vi povis klarigi al la polico, ke vi sciis nenion?”

“Kara Katrina”, diras Tina. “Trankviliĝu, mi petas. Sidiĝu kaj prenu tason da kafo. Post duonhoro ni vespermanĝos ion simplan. Mi certas ke Martin klarigis ĉion al la polico, kaj verŝajne li povos klarigi ankaŭ al vi.”

“Sed ĉu Eddie do ŝtelis tiujn keltajn monerojn el sia muzeo?” diras Katrina kaj sidiĝas. “Kaj ĉu li helpis vendi la svedajn?”

“Mi ne scias”, diras Martin. “Li diris, ke li aĉetis ilin en Bretonio. Espereble li povos montri, ke ĉio estas en ordo. Sed tio estos afero de la franca polico.”

“Ĉu la polico pridemandis vin?”

“Jes, certe. Kaj mi pensas ke ili kredas min. Verŝajne ili komprenas, ke mi sciis nenion pri la moneroj, kiujn ŝtelis tiu Holger Brolin.”

Katrina trinkas iom da kafo por trankviliĝi.

“Kial Eddie sendis tiujn monerojn per vi?” ŝi poste demandas. “Tio estas stranga!”

“Ankaŭ tion mi ne scias. Li diris, ke li trovas la poŝton malsekura. La franca polico devos esplori, ĉu ĉio estas en ordo pri li. La Arkeologia Muzeo apud Parizo havas multajn malnovajn monerojn keltajn kaj romiajn. Certe oni esploros, ĉu iuj malaperis ankaŭ tie.”

Katrina rigardas sian filon. Li ŝajnas trankvila. Tio ja estas bona, ŝi pensas. Sed ŝi mem ne povas trankviliĝi.

“Estus terure, se via patro estus ŝtelisto”, ŝi diras.

“Jes, sed tio ne tre gravas al mi. Tio estus plej terura por lia franca familio. Mi mem neniam vere sentis, ke li estas mia patro.”

Dum la semajnfino, kiun Katrina pasigas en Stokholmo, Martin, Leo kaj Tina klopodas konvinki ŝin, ke ĉio estas en ordo.

“Certe neniu pensas, ke Martin faris ion kriman, kiam li portis la keltajn monerojn al Svedio”, diras Leo.

“Ĉiuokaze tiuj moneroj jam estas ĉe la polico”, klarigas Martin.

Poste daŭras la aŭtuno, dum Martin studas, kaj Katrina laboras. Ili ofte interparolas telefone, kaj kelkfoje Martin vojaĝas al Gotenburgo en semajnfinoj, aŭ Katrina al Stokholmo.

En novembro ili ekscias, ke la urba tribunalo de Stokholmo trovis Holger Brolin kulpa pri la ŝtelado kaj vendado de moneroj el la muzeo, en kiu li laboris. Sekve li devos pasigi ok monatojn en malliberejo. Krome li devos repagi al la muzeo la valoron de la moneroj.

El Francio Katrina kaj Martin aŭdas nenion.

“Eble vi provu kontakti vian patron”, proponas Katrina. “Por ekscii, kio okazas al li.”

“Ne”, respondas Martin. “Mi fajfas pri li. Li povas kontakti min, se li volas ekscii, kio okazis al liaj keltaj moneroj kaj al lia sveda amiko en la Historia Muzeo de Stokholmo. Aŭ kio okazis al mi.”

Sed fakte Eddie sendas nenian pluan leteron aŭ mesaĝon. Ŝajne ne interesas lin, kio okazas al Martin. Eble li volas forgesi, ke li havas filon, al kiu li iam taskis porti monerojn en Svedion.

Dum la aŭtuno iom post iom iĝas vintro, Katrina pli trankviliĝas. Kiam ŝi ne vizitas sian filon en Stokholmo, ŝi laboras en la lernejo kaj kunestas kun sia koramiko Andreas kaj liaj infanoj.

“Estus bone, se ankaŭ Martin havus tiel bonan patron, kiam li estis knabo”, ŝi diras al Andreas.

“Kara Katrina”, diras Andreas. “Li havis la plej bonan patrinon. Tio devas sufiĉi, ĉu ne?”

Glosoj:

arabo^D ano de popolo en Mezoriento kaj norda Afriko /

Arab / アラブ人 / 아랍인

fajfi^D fari akrajn sonojn per pintaj lipoj aŭ per ilo /

whistle / 口笛を吹く / 휘파람을 불다

fajfi pri^D = ne atenti, ne zorgi pri / *not give a damn about*

/ 関心を持たない / ~에 무관심하다, 신경 안써다

Inter-reto ^D tutmonda reta interligaro de komputiloj /
Internet / インターネット / 인터넷
 magazeno ^D ejo por konservi aŭ vendi varojn / *ware-house*,
store / 倉庫・大商店 / 창고, 대형도매점
 novembro ^Ĉ la 11-a monato / *November* / 十一月 / 11 월
 spuro ^D postlasita signo aŭ indiko / *trace* / 痕跡 / 흔적
 tribunalo ^E juĝ-instanco / *tribunal, court* / 裁判所・法廷 /
 재판소, 법원
 vendredo ^Ĉ .. kvina tago de la semajno, inter ĵaŭdo kaj sabato /
Friday / 金曜日 / 금요일
 vikingo ^E nordeŭropa rabisto aŭ komercisto antaŭ mil jaroj
/ viking / ヴァイキング / 바이킹

Teknika postklarigo por instruantoj

La rakonto *Kara Katrina* celas prezenti facilan legaĵon al personoj, kiuj lernis la bazan Esperantan gramatikon kaj la plej bazan vortaron. Ĝi ne estas lernolibro, sed rakonto kun la intenco distri. La lingvaĵo en dek du mallongaj ĉapitroj prezentas progresan defion al la leganto – alivorte: la unuaj ĉapitroj estas plej facilaj, la lastaj malplej. Ĉiuj ĉapitroj tamen uzas ĉefe simplajn, oftajn vortojn, facilajn gramatikajn formojn kaj frazojn kun simpla strukturo. La lingvaĵo konsistas el la praktike uzata, parolata, hodiaŭ vivanta Esperanto.

Aperis ankaŭ la rakontoj *La krimo de Katrina*, *Vojaĝo kun Katrina* kaj *Katrina malfruas* kun simila enhavo kaj la sama ĉefrolulino. Ĉiuj kvar tamen estas sendependaj rakontoj.

Por uzo en miaj facil-legaj rakontoj mi kombinis kelkajn disdividojn de la Esperantaj radikoj, kreante klasigon de la morfemoj laŭ ofteco en kvin grupojn A ĝis D.

En la grupo A, la plej oftaj morfemoj, estas 200 morfemoj, B 256, C 271, Ĉ 450 kaj D 562; entute 1 739 morfemoj. Aldoniĝas grupo E = ĉiuj ceteraj radikoj en PIV 2002, kaj F = ĉiuj ceteraj radikoj.

En *Kara Katrina* aperas morfemoj laŭ la suba tabelo:

Grupo	A	B	C	Ĉ	D	E	F	Entute	Vortoj
Nombro:	197	171	88	62	40	41	1	600	5 902

Post ĉiu ĉapitro mi glosis ĉiujn (nove) uzitajn vortojn el grupoj Ĉ-F, kaj ofte ankaŭ kelkajn aliajn. Aperas ankaŭ anglaj, japanaj kaj koreaj tradukoj de tiuj vortoj. Mi dankas al Edmund Grimley Evans pro reviziado de la anglaj ekvivalentoj.

La libreto do enhavas 600 malsamajn morfemojn, el kiuj 456 estas inter la 727 plej oftaj morfemoj de Esperanto, tio estas la grupoj A-C.

Sten Johansson

Verkoj de la aŭtoro

Originalaj:

Denaska kongresano (novelaro, 1992)

Ĝis revido, krokodilido! (novelaro, 1996)

Interkona mateno (teatraĵoj, 1996)

Mistero ĉe Nigra Lago (romaneto por infanoj, 1997)

Falĉita kiel fojno (krimromano, 1997)

Trans maro kaj morto (krimromano, 1999)

Neĝo kaŝas nur... (krimromano, 2001)

La krimo de Katrina (facila rakonto, 2001)

Dis! (romano, 2001)

Kion ajn (facila rakonto, 2002)

Vojaĝo kun Katrina (facila rakonto, 2002)

Memor' mortiga (krimromano, 2003)

Katrina malfruas (facila rakonto, 2004)

Pasteĉo (25 beletraj stilpastiĉoj, 2005)

Amaro (novelaro, 2005)

Kroze – proze (literatura esearo 2013)

Marina (romano 2013)

Skabio (romano 2015)

El ombro de l' tempo (romano 2017)

Marina ĉe la limo (romano 2018)

Ne eblas aplaŭdi unumane (romano 2019)

Sesdek ok (romano 2020)

Secesio (romano 2021)

Falaflo en maco (romano 2023)

La nepo de Marina (romano 2023)

Plia dozo da prozo (literatura esearo 2024)

Neŭtrale (romano 2024)

Farango (romano 2025)

Kara Katrina (facila rakonto, 2025)

Tradukitaj el la sveda literaturo:

- Hjalmar Söderberg: La kiso (novelaro, 1995)
Pär Lagerkvist, Eyvind Johnson, Harry Martinson: Nobela novelaro (1995)
Torgny Lindgren: La beleco de Merab (novelaro, 1995)
En la realo troviĝas truo (nuntempa sveda novelarto, 1996)
Torgny Lindgren: La vojo de serpento sur roko (romano, 1997)
Benjamin Jacobsen: Inter tero kaj ĉielo (facil-legaj noveloj el la dana, 1997)
Carl Jonas Love Almqvist: Tio konvenas! (romaneto, 1998)
Hjalmar Söderberg: Doktoro Glas (romano, 1998)
Hjalmar Söderberg: La pelto (novelaro, 1999)
August Strindberg: Songödramo (dramo 1999)
Selma Lagerlöf: La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson (2002)
August Strindberg: Insulanoj de Hemsö (romano, 2005)
Hjalmar Söderberg: La serioza ludo (romano 2016)
Frans G. Bengtsson: Orm la ruĝa, volumo 2. Hejme kaj en Oriento (romano 2019)
Tove Jansson: Kometo en Muminvalo (infanlibro 2022)
Tove Jansson: Ĉapelo de sorĉisto (infanlibro 2023)
Tove Jansson: Memoroj de Muminpatro (infanlibro 2023)
Tove Jansson: Somermeza dramo (infanlibro 2024)
Tove Jansson: Vintro en Muminvalo (infanlibro 2024)
Tove Jansson: La patro kaj la maro (infanlibro 2024)
Tove Jansson: Malfrue novembre (infanlibro 2024)

Rakontoj pri Katrina

Katrina estas instruistino en Svedio, kaj la kvar rakontoj pri ŝi en facila Esperanto konvenas por tiu, kiu scias la plej bazan vortaron kaj gramatikon. Ili estas verkitaj en facila lingvaĵo, sed plej facilaj ili estas en la komencaj ĉapitroj. Post ĉiu ĉapitro sekvas klarigoj de malpli facilaj vortoj.

La libretoj ne estas lernolibroj, sed prezentas facilan legaĵon por ĉiu, kiu volas uzi siajn akiritajn sciojn de Esperanto por legi distrajn rakontojn.

La krimo de Katrina - unua rakonto -

temas pri vojaĝo de Katrina al Berlino por serĉi sian amon de la antaŭa jaro, sed ne facilas trovi ĝin sen fari krimon!

Vojaĝo kun Katrina - dua rakonto -

temas pri Katrina kaj ŝiaj lernantoj, pri vojaĝo de Gotenburgo al Bjalistoko, pri serĉado kaj sopiroj. Sed unue kaj laste ĝi temas pri amikeco inter junaj homoj.

Katrina malfruas - tria rakonto -

temas pri la klopodoj de Katrina formi sian vivon kun amo, laboro kaj familiaj rilatoj. Kial ŝi ĉiam ripetas la eraron de sia patrino? Kaj kial la patroj emas malaperi?

Kara Katrina - kvara rakonto -

okazas dudek jarojn post la tria. Ĝi temas pri novaj familiaj rilatoj, pri muzikado, velado kaj la emo forgesi, ke la filo ne plu estas infano. Krome pri nova krimo – tamen ne de Katrina.